

LEIPZIG, la 1^{an} de maio 1909.
(Germanujo)

Nr. 7, I.



La spirito

Internacia sessemajna gazeto por
ŝerco, humoro kaj satiro.



Pri kapto, malsovaĝigo kaj dresado de l' viro.

La plej utila dombesto, kiu estas tre grava por la virinaro, estas en lia alklimatigita stato la viro — science nomata: *homo sapiens masculinus*. Sovagaŝtate oni nomas lin fraŭlo, — kaptita, malsovaĝigita kaj dresita li estas nomata edzo. En sovaĝeco, dum kiu al li la katenoj surŝarĝotaj al la naturo, nomataj „edzeca jugo“, estas nekonataj, li plej ofte vivadas en bandoj, kiuj kutime vespere iras al trinkejoj.

Tiaj trinkejoj precipe estas liaj favorataj estejoj, kaj tie li prefere ĉerpas bieron. Ekzistas ekzempleroj, kies soifo estas senfonda; ili estas facile rekoneblaj je la ruĝa koloro de l' flarilo. Samtempe tiaj individuoj mortbatas la tempon per ĉiaj ajn amuzajoj, ĉe kiuj ili ofte montras grandan persistemecon. Ilia prefera okupado estas la karto-, kubo-, keglo- kaj bilardoludoj. Dum ĉi tiuj ili ofte treege bruas kaj blovas fumnubojn el la buŝo tiamaniere, ke la plafono kaj la kurtenoj de iliaj loĝejoj fikoloriĝas kaj malbonodoras.

Sed ekzistas ankaŭ alia pli malofta speco, kies anoj sidadas dum tuta tago en loĝejo. Ĉi tiuj englutas librojn; plej ofte ili mordetas je malsatotuko, almenaŭ dum la dua duono de l' monato. Oni nomas ilin studentoj, ankaŭ librovermoj. Kiam ili montras tiajn ecojn, ili troviĝas en granda metamorfozo; ili forjetas

Specimena ekzemplero.

baldaŭ la konsumatan haŭton de l' kandidato kaj sin nomas tiam doktoroj. Jen danĝeriga speco — oni sin gardu je ili! — ĉar ili sin alŝuĉas kvazaŭ hirudoj kaj ne defalas, ĝis ili estas plensuĉigitaj, nome el la monujo; ili havas la econ, ĉiam voli pruntepreni ion. Sen escepto la tuta speco treege interesiĝas je la speco de la cervidinoj (ankaŭ nomataj: junulinoj), sed grandan timon kaj antipation ili montras, tuj kiam proksimiĝas maljun —, t. e. gvidbestoj (vulgare maljunaj sinjorinoj kaj bopatrinoj).

Ilia konduto apud maljunbestoj estas tre diversa. Kontraŭ la cervidinoj ili klopodas prezentiĝi en plej bona lumo, al tio puŝataj de interna aspirego kaj je la intenco, gajni pli proksiman alligon. Se tia individuo atingis tian celon, aŭ opinias, esti ĝin atinginta, tiam pluaj virtoj montriĝas je li, la tielnomataj naturaj kapablerecoj, kaj li alportadas ne murmurante mantelojn kaj ombrelojn, montras sin ankaŭ kiel fidela kaj sindonema protektanto. Ĉe precipe obstinaj kazoj, li subite revas pri floroj, kaj tiam la tempo de lia kapto estas alveninta; nun la estonta estrino devas penadi per ĉiaj delogartaĵoj ligi al si la besteton per iom post iom pli fortika ligilo, kaj se ĝi estas daŭreme katenita, oni povas ŝovi ringon sur ĝian manegon kiel signo de ĝia dresado. Se la dresado estis sukcesa, unu rigardo sufiĉas por ĝin obeemigi. Kvankam la viro ŝajne troviĝas bone en la kaptiteco, tamen li ofte resovaĝiĝas, t. e. lia dresado malaperas, tuj kiam la estrino lin ellasas el siaj okuloj. Ĉi tiu stadio inter sovaĝeco kaj dresiteco estas sendube la plej grava kaj duba.

Pro tio bezonas grandan lertecon; ĉar ofte decidigamamente li obstinstariĝas kaj eĉ forrapidas. Sed estas ankaŭ kazoj, je kiuj tia vira homo sin lasas tiel bone dresi, ke li faras jam pro la unua vorto ĉion, kaj ĉion bone, kaj timas la pantoflon. Por tio kelkfoje sufiĉas la eksteraĵo de la virino. — Se kelkaj viroj estas allogataj, inter ili ofte naskiĝas disputegoj kaj la intermordado ne ŝajnas finiĝi. Ofte oni haltigas ilin per fortiga bongusta nutraĵo. Plej facile oni ilin kaptas per amazkunkpeladoj, ankaŭ nomataj: societoj, dancamuzadoj kaj baloj.

Je dresataj viroj korpa punado malofte bontaŭgas, ili per tio iĝas mantimemaj. Bonaj vortoj tial estas multe pli efikaj kaj oni atingas, kiel jam dirite, la plej favorajn rezultatojn per bona furaĝo kaj karesa traktado. Tamen se ekzemplero reĝis sovaĝa, ĉia penado por rekapti ĝin, estos vana, kio estas precipe rimarkebla, je pliaĝaj ekzempleroj; junaj estas ĝenerale pli facile kapteblaj kaj dreseblaj.

Sufiĉe stranga estas la cirkonstanco, ke oni, male al ĉiu alia ĉasaĵo, pri la tielnomata vira homo povas facile ekscii la aĝon. Kvankam la nombro de la finoj de l' kornaro, kiun la dresita *homo sapiens maskulinus* kelkfoje portadas, al tio ne helpas, la koloro de lia hararo neniam trompas pri la efektiva aĝo, kaj estas tiu ĉi cirkonstanco, kiu signas lin en la naturhistorio kiel apartan specialaĵon el niaj ĉasaĵoj kaj dombestoj.

Trakudis Karl Ba...l, Graz.

Terura infano!



Fraŭlino: Nu Linjo, kial vi tute ne ĝojas pri via malgranda frateto hieraŭ alveninta?

Nevineto: Ha, mi timas, ke mi tiam amus lin tro, kaj eble eĉ formanĝegus lin.

Fraŭlino: Formanĝegus lin? nu nu, kio inspiris do al vi ĉi tiun strangan ideon?

Nevineto: Jes, onklo Maxo hieraŭ vespere diris en la malluma laŭbo al vi: „Mi povus formanĝegi vin pro amo.“

Profesia diskreteco.



— Ĉu la dukino ne demandis vin, kian harkostumon mi havos sur la balo ĉe la ministra moŝto? espereble vi silentis pri ĝi...

— Ho! ne dubu via baronina moŝto, neniam mi kulpiĝos similan maldiskretaĵon.

— Sed, diru do, kiele venos la dukino?

— En harkostumo de la jaro 1830.



Antaŭ spegulo.

Ĉu la viroj nu valoras, ke oni pasigas sian duonan vivon ĉe la tualetto?

El nia kunlaborantaro.

Du anglaj.

Socialismo de la strato.

„Jen, Tomĉjo, vi estas vera socialisto, donu al mi pipon da tabako.“

„Tabako? Ho, ne, tute ne! Vidu! Mi partigos la virinojn kaj la monon, de kiuj mi nenion havas; sed la tabako, de kiu mi iom posedas, estas sankta.“

Granda gajno.

Klubano: „Ha, jen vi, amiko mia. Vi aspektas tre bone. Ĉu vi gajnis iom da pezo ĉe la marbordo dum la somero?“

Amiko: „Jes, certe! Mi gajnis kvindek kilogramojn.“

Klubano: „Ho, ne estas eble.“

Amiko: „Fakte! Venu kun mi al la domo, kaj mi montros ŝin al vi. Ni edziĝis lastan monaton.“

Klarigita.

Ŝi: „Tiu paro de gejunuloj ŝajnas tre bone konsentiĝi. Ĉu ili estas edziĝintaj?“

Li: „Jes, sed ne kune.“

Clarence L. Dean,

24 Phoenix Lodge Mansions, Brook Green, London W.

* * *

La malnovaj vestoj de *Rockefeller*. Korespondanto sendis al mi amuzan rakonton pri Sro John D. *Rockefeller*. La malzorgemeco de la fama milionulo estas ĉie konata. Foje amiko renkontis lin kaj provis influi lin, ke li portu pli bonajn vestojn. „Mi miras“ diris la amiko, „ke vi permesas al vi mem tiajn malbonajn vestojn.“ „Mi ne tion faras“ indignis Sro *Rockefeller*. „Se vi ja tion faras“, insistas la amiko, „memoru vian patron. Li ĉiam portis bonajn vestojn; liaj vestoj ĉiam bone vidiĝis.“ „Ho“, ekkriis Sro *Rockefeller* kun triumfo, „tiuj ĉi vestoj kiujn mi hodiaŭ portas estas la vestoj de mia patro.“

Malfacila laboro.

Dum vojaĝo tra la Sudaj Ŝtatoj de Usono antaŭ ne longe, *Wu-Jen-Fang*, la ĥina ambasadoro ĉe „Washington“, tre rimarkis, ke la plej granda parto de ĉia laboro, en unu de la vizititaj urboj, estis farata de nigruloj. Kien ajn la tiea komitato kondukis lin, ĉu al fabrikejo, al butikoj, al apudurba plantejo, ĉia la plej malfacila laboro estis farata de nigruloj.

La ambasadoro *Wu* tiam nenion diris, sed vespere kiam li ĉeestis honoran balon kaj observadis la dancadon kaj valsadon, li rimarkigis al sia gastiganto: „Kial vi ne igas la nigrulojn, ke ili faru tion ĉi por vi ankaŭ.“

El la angla gazeto „M. A. P.“

Amerika.

Dommastrino diris al sia servistino: „Mi timas ke mi neniam povos lernigi ion al vi, *Maggie*. Ĉu vi ne scias ke vi ĉiam devas enmanigi al mi leterojn kaj kartojn sur prezent-telero?“

„Certege mi tion scias“, respondis la servistino, „sed mi ne sciis ke vi ankaŭ scias ĝin.“

El „Harpers Weekly“.

Bonfama advokato rakontas jenon pri sia penado instrui bonan konduton al sia ofiknabeto: Antaŭ nelonge la juna servisto eniris la oficejon kaj ĵetinte

sian ĉapelon sur tablon ekkriis: „Ho, Sinjor“, estos pilkoludo ĉe la parko hodiaŭ, kaj mi ĉeestos.“

L'advokato ne estas sensentulo kaj volis permesi al la knabo ke li foriru; sed li opiniis ke estis konvena okazo por instrui lin pri bona konduto.

„Jimmie“, li diris, „tiele ne decas peti permeson; venu tien ĉi kaj sidiĝu, por ke mi montru al vi, kiele oni devas fari tion.“

La knabo sidiĝis sur oficejan seĝon, dum la advokato prenis ĉapelon kaj foriris. Tiam li molete malfermis la pordon kaj, tenante en la mano la ĉapelon, diris kviete al la knabeto en la seĝego:

„Estos, sinjoro, pilkoludo ĉe la parko hodiaŭ; se vi eble bonvolus indulgi min, mi treege dezirus liberiĝi dum la posttagmezo.“

Tuj respondis la knabo:

„Certege do, *Jimmie*, kaj jen estas spesmilo por la enirpago.“

El „Short Stories“.

Juĝisto: „Vi diras ke vi deziras eksedziĝon, ĉar via edzvivado estas nur senĉesa batalado. Sed vi ne ŝajnas tiele.“

Petanto: „Certe via Moŝto, sed vi devus rigardadi mian edzinon.“

El „The Circle“.

Instruistino: Johano, vi devas resti en la lernejo pluan horon kaj studi.

Johano: Ĉu vi restos kun mi?

Instr.: Jes.

Joh.: Ĉu per tio vi punos min, aŭ mi vin?

El „Life“.

Tradukinto: C. A. Vilas, Milwaukee.

Du aŭstraj.

Distreco.



A: „Ĉu la profesoro efektive edziĝis kun la filologino? Ili devas esti farigintaj certe tre distrita paro!“

B: „Ho, certege! dum la edziĝa soleno li havis la mirtan kronon sur la kapo, ŝi la cilindran ĉapelon.“

Punita senkulpo.

Antaŭ la pordego de lernejo staras malgranda laktveturilo, al kiu estas jungita azeno. Kelkaj lernantoj incitas kaj kolerigas la beston. Ĝi maltrankviligas: kelke da laktpotoj falas teren, la enhavo plenigas la trotuaron. Furiozege almarŝas la laktvendisto donante vangfrapojn dekstren kaj maldekstren. Unu el ili ricevas knabo, kiu estis senkulpa rigardanto de la petola sceno. La bedaŭrinda bubeto plorante frotas sian vangon kaj volas iregi al la direktoro por plendi sian suferon. Sed ĉar la doloroj pri la ricevita vangfrapo okupas lian tutan atentecon, ĉe la ŝtuparo li puŝas per la kapo en la ventron de l' instruisto, kiu ĵus malsupreniris la ŝtuparon. Klak — kaj li estis feliĉa ricevinto de dua vangfrapo. Kriegante li atingas la ĉambron de la direktoro. Ploreante li diras: „Mi petas la sinjoro instruisto estis donanta al mi vangfrapon kaj mi, mi ja al la azeno nenion faris.“ Kompreneble donis la direktoro al la „impertinenta“ lernanto fortan vangfrapon. Faras do tri vangfrapojn, kiujn ricevis senkulpulo, ĉar liaj amikoj incitis azenon.

(el svisa gazeto.)

Ĝentila rabisto.

Rabisto ĉe la eniro en arbaron al la turisto: „La vojo tra la arbaro estas danĝera, Sro! Ĉu vi ne volus fordoni antaŭe viajn multekostaĵojn?“

Bona elturnigo.

Barono, kiu volonte ion bonan trinkis, surskribigis, por deteni aliajn trinkemulojn, sur la vinbotelon la vorton „veneno“. Unu tagon li trovis sian serviston, kiam tiu ĉi ĵus forte trinkis el la vinbotelo.

„Malbenitulo!“ kriis la barono, „ĉu vi ne povas legi? ĉu vi ne vidis la surskribon „veneno“?“

„Mi volis kunmorti kun mia sinjoro“ respondis la servisto!

„Patrino, kial kantas la fratino ĉiam tiel multe dum la ĉeesto de sia fianĉo?“

P: „Laŭ mia opinio por provi lian amon al ŝi!“
(el „Chicago Record Herald“).

Ofendo.

Filino: „Ho, patrinjo, kia ofendo!“

Patrino: „Kio okazis, kara infano?“

Filino: „Pripensu nur, mia iama fianĉo ĵus resendis mian fotografajon kaj nomas ĝin: „specimeno sen valoro.“

Kolektis A. Siebenschein, Wien.

* * *

Ĉe la stacio.

A: Kien vi veturas?

B: Parizon.

A: Kaj vian edzinon, kial vi ne kondukas ŝin kun vi?

B: Brave! Estus same kvazaŭ vi veturus Monakon kaj kunportus vian bierpokalon.

Kapitano: Leŭtenanto *Stupidetti*, diru al mi ke mi estas azeno.

Leŭtenanto: Sinjoro kapitano, mi anoncas ke mi ne povas diri tion-ĉi.

Kapitano: Mi komandas.

Leŭtenanto: Sinjoro kapitano, mi anoncas respekti ke vi estas azeno.

Kapitano: Kaj ĉu vi scias, kial? Ĉar mi mem proponis vin leŭtenanton.

Dro Arturo, Triesto.

Belga.

La Regimentestro estas ĉe la bano.

Kapitano sonorigas ĉe sia regimentestro. — La servsoldato malfermas al li. — Ĉu la regimentestro estas hejme? — Ne, mia kapitano, li iris al la bano. — Diablo! Mi estas lin atendonta en lia oficejo. — Bone, mia kapitano. La servsoldato enkondukas la kapitanon. — Unu horo pasas, baldaŭ du. La kapitano ekmalpacienegas kaj sonorigas al la servsoldato: — Ĉu la regimentestro neniam revenos? — Post unu monato, mia kapitano. — Ĉu vi ne diris al mi ke li foriris por preni banon? — Jes, al Ostendo [Belga banloko], mia kapitano. — Vi estas nur malspritulo. — Jes, mia kapitano. [El franca l. mi tradukis.]

Kampanano promenis tra unu el la Bruselaj stratoj kaj vidis senharan barbiron starantan sur la sojlo de lia magazeno. — Sinjoro, diris nia kampaneto, ĉu vi ankaŭ vendas tiun aferon dank' al kiu la haroj denove ekkreskos? — Ho jes, amiko, respondas li, nur tien-ĉi eniru. — Rigardu foje, jen produktaĵo kiun al ĉiu mi povas rekomendi. — Vidu, tie pendas la atestoj de ĉiuj profesoroj, kiuj uzis ĝin. — Dudek kvar horojn post la uzo, la harkreskado estas klare videbla. — Nun, diris la vilaĝano, disverŝu nur duonon da boteleto sur vian kapon; mi certe venos postmorgaŭ por vidi en kia stato via kapo estos. [El flandra l. mi tradukis.]

Antonio Cocks, Antverpeno.

Du bohemaj.

Mensogema proverbo.



(Fripono forlasante vaporŝipon):

Sensencaĵo! „Kun honesteco plej malproksimen vi venos!“

Ridinde! Se mi estus restinta honestulo, estus mi ĝisnune hejme sidinta! Sed ĉi-tiamaniere eĉ Kalifornion mi venis

V. Luža, Blansko.

La ruza forĝisto.

Unu dimanĉon la vilaĝa paroĥestro predikis pri mirakla satigo de multego da homoj per kelkaj panpecoj; sed pro oratora fervoro li translokigis la vortojn kaj diris: „... kaj per dekdu mil panpecoj Jesuo satigis kvin homojn...“ Neniu el la ĉeestantoj ekrimarkis la eraron krom la forĝisto apude starinta, kiu moke ekridetis; tion vidis la paroĥestro, ekgripcis la dentojn kaj ekpensis: „Atendu, fripono, mi ja montros al ci...!“

Post unu jaro la sama prediko okazis. Tiun ĉi fojon, akcentigante ĉiun vorton, la pastro diris ĝuste: „... kaj per dekdu panbuloj Jesuo satigis kvin mil homojn!“ Kaj sin turnante al la forĝisto, li aldonis: „Ĉu vi ankaŭ povus tion fari, forĝisto?“ „Kompreneble“, respondis tiu ĉi, „ĉar al mi restas ankoraŭ multe da pano de l' pasinta jaro!“ — Voĉo.

Fragmento de teksto laŭ plej nova „scienca“*) skribmaniero:

.... En 7 tembro 1/4 bar — dis 3 ti 8 n.

Kel & 28 j — tis — 0001 an 9 zon 3 nkinte 8 aze en la & uto 8cidente de la 10 livo.

Mi 2 bas pri 10 stra 8 ulo de L 7 ovi 8.

2 m 8tobro — 2 10 laracion al k 1 loj!

Via ŝobo — szulo.

[Solve: En Septembro unu barono sendis tritikon. Kelkaj dukoj sentis senliman naŭzon trinkinte okaze en la kajuto okcidente de la deklivo. Mi dubas pri dekstra okulo de Ludoviko.]

Dum oktobro sendu deklaron al kunuloj!

via Jakobo senspesulo.]

Du bulgaraj.

Scivolema nepo.

— Avo!

— Kion vi deziras, mia nepo?

— Diru al mi, de kie oni enverŝas lakton en la bovinon?

Antaŭ la danco.

— Mi petas, fraŭlino...

— Pardonu; mi ne dancas!

— Sed mi vin petas, fraŭlino: vi sidas sur mia ĉapelo.

Recepto kontraŭ dentdoloro.

— Kiam mi havas dentdoloron, mi kisas mian amatinon kaj la dentdoloro forpasas!

— Ha, diru al mi, mi vin petas, kie loĝas via amikino, ĉar mi havas teruran dentdoloron.

Ĉiu al sia afero.

En unu juĝejo la juĝisto demandas la juĝatan vilaĝanon:

— Tiu ĉi homo diras, ke vi ŝuldas al li. Ĉu estas vere?

— Tio estas lia afero.

— Sed ĉu vi ŝuldas al li?

— Tio estas mia afero.

— Tamen mi vin juĝos!

— Tio ja estas via afero.

La viroj mensogas.

— Ĉiuj viroj mensogas...

— Kial vi tiel opinias, sinjorino?

— Kiom da ili ĵuris al mi pri amo! Kaj nur unu edziĝis kun mi!

Nerefutebla pruvo.

Li: Mi vin amas senlime!

Ŝi: Pruvu al mi, ke vi efektive amas nur min...

Li: Tuj. Se vi deziras, mi eĉ forlasos fraŭlinon Darina!

En la lernejo.

Instruistino: Lernantoj! kiu povas diri al mi la multnombro de „infano“?

Unu lernanto: „Dunaskitoj“, instruistino!

Patra edifado.

— Vasĉjo, mi rimarkas, ke ci lernas mensogi... Tio ĉi estas tre, tre malbona! Parolu, kareguleto, ĉiam nur la veron, eĉ se ĝi alportus al vi malagrablaĵon... Estu ĉiam sincera kaj verema. Ne mensogu eĉ ŝerĉe! Ĉu vi promesas?

— Jes, mi promesas, paĉjo!

— Nu, bone! Tiam iru ludeti, sed rigardu antaŭe, kiu sonoras! Se estas la kudristo, diru al li, ke mi ne estas hejme!

Kolektis kaj esperantigis Iv. H. KRESTANOF, Sofio.

* * *
En la juĝejo.

La juĝisto: Kulpigato, kiom da sakoj da terpomoj vi ŝtelis de l' ĝardenisto?

La kulpigato: Sep! lunde 3 kaj marde 2.

La juĝisto: Do vi estas ŝtelinta nur 5.

La kulpigato: La aliajn 2 mi intencas ŝteli tiuĉivespere...

Sperta ĉasisto.

— Ĉu vi povas diri al mi, kiel oni povas kapti leonon?

— Tre facile. Vi prenos dezerton, vi traŝutos ĝin per krado, la sablo trafalos kaj la leono restos sur la krado...

Komerca diplomatio.

Iu plendis al Rotsildo ke lia amiko prunteprenis 10000 fr. kaj ilin ne redonis al li, ĉar kontraŭ la pruntedono li ricevis nenian dokumenton.

— Skribu al via amiko tian leteron, konsilas Rotsildo: „Kara amiko, resendu al mi 20000 fr., kiujn mi pruntedonis al vi, ĉar mi tre bezonas monon.“

— Sed... sed li ŝuldas al mi nur 10000 frankojn!

— Tute la saman li skribos al vi kaj tiam vi havos dokumenton, per kiu vi povos lin juĝigi.

Nikifor Hristoskoff-Sofio.

Fina.

Li sciis.

Instruistino: Do, miaj infanoj, per la okuloj ni vidadas. Diru nun Johno, kion oni faradas per la nazo?

Johno: Per la nazo oni portadas okulvitrojn.

En lernejo.

Profesoro: Sarén, konstatu la teoremon de Pythagoras!

Sarén: Laŭ mia opinio oni povas konfidi ĉion kion Pythagoras diras ankaŭ sen konstato.

de Leo Jalava, Abo.

Kvar francaj.

Malkompreno (Miskompreno).

Kuracisto estis ordoninta al malsana viro recepton, kie troviĝis la jena rimarko: *Forte skui antaŭ l'uzado.*

*) La „Scienca Revuo“ uzadas anstataŭ „kaj“ la signon „&“.



Maja kanto.

Jen fine Majo la ĝojiga,
Kiel poetoj kantas tion,
Kaj la printempo malfruinta,
Ĝi tuj rebonigas ĉion.

Dum la sezono, kie pleje
En ĉia brusto l' amo kreskas,
La dolĉaj koroj de l' knabinoj
Denove amfrapotaj estas.

Jes! dum la Majo nun diŝjetos
Multe da blankaj ĉerizfloroj,
La kontraŭiamon baldaŭ trovos
Multe da amflamegaj koroj.

Certege ree kisoj multaj
Kaj ŝuroj el la lipoj fluos,
Principoj eĉ la plej belegaj
Tien — al diablo — ili flugos.

Alflugis do la Maj' denove
Kun ĝi mondo ebriiganta,
Kaj Amor' estos nun sendube
Miraklojn siajn refaranta.

La sekvonta numero aperos la 10^{an} de Junio. Ĉar la provizo de la unua numero elĉerpigis, pluaj abonaj valoroj por la jaro 1909; tamen la numeroj 2 k. t. p. estas ankoraŭ liverblaj.

Kiam l'edzino de la malsanulo ricevis la farmaciaĵon, sur kiu ankaŭ troviĝis skribita la sama rimarko, ŝi energie skuis — ne la medikamenton, sed la malfeliĉan pacienton; kaj regule antaŭ la trinkado ŝi ripetis ĉiujn du horojn la skuadon, kredante tiel plenumi la preskripton de la kuracisto. En la sekventa tago, kiam ĉi tiu revenis, la paciento estis kvazaŭ mortanta. Ekstreme surprizita nia Eskulapo demandis la virinon, ĉu la medicinaĵo ne bone efikis, kaj ŝi nun respondis: „Ho ve! jes, kara sinjor' doktoro; la medicinaĵo estis eble bona, sed la skuadon li ne povis toleri.“

La medicinisto de Bismark.

La jena historieto montras, kiel profesoro *Schwenninger* fariĝis la persona kuracisto de *Bismark*.

La kanceliero tre suferis de podagro kaj ne povis facile resaniĝi, pro tio ke li multe laboris, bone kaj multe manĝis kaj ankaŭ multe fumis. Nenia medicinisto povis lin helpi ĝis la Bavaro, doktoro *Schwenninger* alvenis. Ĉi tiu trovis lin en plorinda, kvazaŭ senespera stato. Li demandis la pacienton, kiu terure ĝemis, pri lia antaŭa vivado, lia nutrado, liaj kutimoj k. c. Tia longa pridemandado tedis kaj lacigis *Bismark*'on, kiu malbonhumore ĝin malpermesis. „En tiu kazo“, respondis la kuracisto, „vi devos nur venigi veterinaron; tiu ĉi ne bezonas pridemandi siajn klientojn.“ *Bismark* komence restis stupida pro tiu kruda malpoliteco, sed baldaŭ li ridis malgraŭ siaj doloroj kaj konservis la faman Bavaron kiel sian personan mediciniston. *Schwenninger* estis la sola viro, kiu havis potencon sur la fera kanceliero.

Boucon, profesoro, Annecy.

Malĝoja Rakonto pri nutrajfalsajtoj kaj tri ratetoj.

Tri ratetoj tiel multe amis sin unu la alian, ke ili ĉiam kune vivadis.

Ian tagon, ili malsataj promenis tra sia hejma grenejo, serĉante manĝaĵojn.

La unua rateto ekvidis belegan allogantan fromaĝon; li tuj rapidis al tiu princa manĝo, kaj da ĝi pecon englutis.

Sed... ho ve... post ses sekundoj, li mortis...

La fromaĝo estis falsita...

Samtempe, kiam la unua rateto aliris la fromaĝon, la dua ĝoje vidis bluan paperan sakon, sur kiu estis Esperante skribita „Faruno“. Tial ke li konis tre bone nian karan lingvon, li, kiel eble plej rapide alkuris. Baldaŭ, la sako estis difektita, kaj iom da faruno manĝita.

Sed... ho ve... post ses sekundoj li ankaŭ mortis...

La faruno estis falsita...

Vidante tiun duoblan morton de siaj ambaŭ amikoj,

la tria rateto multege ploradis, kaj, ne povante vivi sola, decidigis sin mortigi. Li direktis sin al skatolo sur kiu troviĝis jena surskribo: „Ratmortiga pulvoro“. Tuj li eniris ĉi tiun skatolon, kaj formangis ĝian tutan enhavon.

Sed... ho ve... li ne mortis...

La ratmortiga pulvoro, estis falsita...!!!

Vortludoj.

— Kiu malŝatas kartludon, tiu ne povas havi ĉe sia domo terasojn (ter-asojn).

— Salono kaj salero estas similaj, tial ke ambaŭ estas parto da salo.

— Malgranda komo estas kometo.

— Se violon oni dispartigas, ĉiu parto fariĝas violono.

Kolektis: René Beck.

* * *


Malfeliĉa viro!

Rakonto de Dro Quertant (franca).

Kiam li mortis, sinjoro *Ranakapos* ekmeditis malĝoje:

„Kien do, li diris, mi nun iros? Certe mortinto ne povas ankoraŭ vivi kun la aliaj homoj. Mi do devas iri ĉu en Paradizon, ĉu en Purgatorion, ĉu en Inferon. Sed kien? Ŝajnas al mi ke mi estis bonulo dum mia tuta vivo. Mi do kredeble devas sidiĝi sur belega ora seĝego proksime la Patro eterna. Ni do iru al Paradizo!“

Li prenis sian cilindran ĉapelon, kiun li atente brosis; li sin vestis per sia plej bela kostumo kaj eniris fiakron: „Veturigisto, mi iras Paradizon; rapidegu, mi petas!“ La veturilo rapidis; kaj, kvankam ĝi preskaŭ alproĉis kelkajn stelojn, kvankam ĝi eltiris per sia stupo



la harojn de kometo, kiu pasis kaj kiu kriis al ĝi insultojn, ĝi, post tri tagoj, du horoj, kvin minutoj kaj kelkaj sekundoj (mi malfeliĉe ne plu bone memoras la nombron) haltigis antaŭ la pordo de Paradizo. Ho! kiu bela pordo, kun oraj literoj kaj belegaj marmoraj skulptaĵoj! „Ŝajnas la pordo de nia urbdomo,“ ekpensis nia amiko *Ranakapos*!

Tamen, iome timigita, li tiris la argentan tenilon de la sonorileto. Post momento, bela maljunulo, kun longablanka barbo kaj ŝlosilaro en mano, malfermis la pordon: „Ha, jen vi, Ranak-



Ludovic Rodot or.

apos“, diris Sankta Petro kun dolĉa rideto. „Ĉu vi havis bonan vojaĝon? Oni anoncis al mi vian morton kaj mi atendis vin. Ĉiuj mortintoj tuj venas tien ĉi. Kion vi deziras?“

— „Heu! grandega Sanktulo, mi multe dezirus malgrandetan sidlokon en tiu belega Paradizo.“

— „Ha vere! mia amiko. Ĉu vi do kredas ke oni eniras en Paradizon kiel en muelilon? Ĉu vi faris ion por eniri Paradizon? Se mi bone memoras, vi multe ŝatis trinki glasojn, vi ofte ebriiĝis kiel . . . kiel . . . mi ne volas diri kiel kiu, por ne fari pekon! Se nur vi estus Esperantisto, Dio eterna estus eble por vi pli indulgema. Vidu; ĉu vi edziĝis?“

— „Jes, pia Sanktulo, kaj mia unua edzino pied-frapis min la tutan tagon! Ha! mi estis vere malfeliĉa . . .“

— „Ĉu vi do edziĝis duan fojon? Vi do meritus ke oni vin kanonizu!“

— „Malfeliĉe, Petro sanktega, kaj mia dua edzino devigis min purigi ĉiutage la tutan teleraron kaj la meblaron. Sed feliĉe la tria . . .“

— „Kiel!“ ekdiris Sankta Petro, „vi do edziĝis trian fojon?“

— „Jes, kompatema pordisto, kaj . . .“

— Sed Sankta Petro furioze ekkriis per fortega voĉo, kiu faligis du stelojn:

„Ha! Ha!! Ha!!! Vi edziĝis trian fojon! Vi edziĝis trian fojon!! Foriru do, senhontulo; forkuru rapide, multmegulo! kaj memoru ke se, tie ĉi, ni bone volas ricevi ĉiujn bonulojn, ni neniam akceptos la frenezulojn!“

Kaj jen kial Ranakapos, kiu estis malfeliĉa dum sia vivo, estas tamen en Purgatorio. Preĝu por li!

* * *

La fenomeno.

Iam instruisto demandis en la lernejo al siaj lernantoj la signifon de la vorto FENOMENO. Ĝenerala silento estis observata. Neniu povis ion respondi. Tiam la instruisto sidiĝis sur sian seĝon kaj daŭrigis: Atentu! Vi scias kio estas bovino. Tio ne estas fenomeno. Vi scias kio estas pomujo. Tio ankaŭ ne estas fenomeno.

Sed se bovino supreniras pomujon kaj kolektas pomojn kun sia vosto, tio ĉi estas fenomeno. Nun mi esperas ke vi komprenis.

Knabeto deziris paroli, ricevis parolon kaj diris: Via instruista moŝto, vi ne malpli estas fenomeno, ĉar vi ne povos fari tiom kiom la bovino.

Kopernika globo.

Virino prezentiĝis lastatempe ĉe ia vendisto de sciencaj artobjektoj kaj demandis al li terglobon prezentanta la Kopernikan sistemon. Ĉu ĝi estas aŭtentika? demandis la virino. „Jes“, respondis la vendisto, „mi rekte korespondis kun Koperniko kaj estis li mem kiu adresis al mi tiun ĉi globon.“

La laborado dum la dormado.

La ĉefo de la ministra oficejo severe al la unuo el siaj subuloj. „Mi estas devigita ŝanĝigi vian servon. Ne nur vi dormas en la oficejo, sed eĉ ronkas, kaj per tio vekas ĉiun momenton la ĝeneralan direktoron, kiu laboras en la apuda ĉambro.“

H. Hoog, Yverdon.

tri germanaj:

Fianĉino rekomendinda.

Junulo festante sian fianĉigon kun la unuopa filino de la komercisto N. diras al la knabo Karlo, sia estonta bofatro: „Ĉu vi ne volas gustumi, kiun guston havas la ĉampanvino? — Karlo: Mi konas ĝin. Ni estas jam festintaj kelkfoje fianĉiniĝon.

Studento en la gastejo.

Barbara', mi jam trifoje estas postulinta glason da akvo.

Barbara': Mi ne lasas min mistifiki. Mi scias, ke ni havas hodiaŭ la unuan de aprilo.

La timema domestro.

„Ĉu vi ne scias, mia filo, kial la patrino estas tiel ĉagrena?“ — „Ŝi ne povas trovi la ŝlosilon de la domo.“ „Ho“, ekkrias la patro, „en tiu ĉi kazo mi estas senkulpa; en miaj manoj neniam ĝi troviĝas.“

La kuzo: Jes kara kuzino, mi edziĝus volonte kun via amikino, sed ŝi estas tro malprudenta.

La kuzino: Vi estas prava; vi devas edziĝi kun knabino, kiu havas prudenton por du.

Studento al la konduktoro: En tiu ĉi stacio oni ne povas ricevi bieron; kial do vi haltis?

Instruisto: Kion ni devas fari, antaŭ ol ni povas ricevi pardonon pro niaj pekoj? — Peki, sinjoro instruisto.

Direktoro al vidvino: Antaŭ ol mi povas pagi la valoron de la poliso, vi devas alporti l' ateston, ke via edzo estas mortinta. — Kun plezuro, sinjoro.

Profesoro: Pli frue oni kredis, ke *Homer'o* estis blinda; nun estas certigata, ke li neniam estas vivinta. La vero estas supozeble en la mezo.

Dro Förster, ĉefkuracisto, Münster, W.

(Wiena klišajo).

Danĝero de l' dueco.



— Sinjor' doktoro, je neniam kondiĉoj mi toleros plu, ke vi tiel ofte promenas sole kun mia filino!
 — Ĉu sinjorina moŝto do ne konfidas al mi?
 — Ho, al vi mi certe konfidas!
 — Ĉu vi do ne konfidas al fraŭlin' filino?
 — Ho — ankaŭ al ŝi; sed al vi ambaŭ kune mi ne konfidas!

Pastro instruas knabojn en lernejo pritraktante la miraklojn. Por provi, ĉu la infanoj komprenis lin, li demandas malgrandulon: „Antoĉjo, se oni rakontas al vi, ke tegmentisto falis de la katedrala turo (la katedralo en Köln estas 156 metrojn alta) ne vundiĝinte, kio estas tio?“ — „Feliĉa ŝanco“ respondis Antono. „Bone; sed se ĝi okazus duan fojon?“ — „Hazardo“. — „Bonege, sed la trian fojon?“ — „Mensogo, via pastra moŝto.“

Du viroj eliras ĉambregon, en kiu ili ĉeestis paroladon kontraŭ la alkoholo. La unu diras al la alia. Mi tute ne komprenas, kion li volas je sia alkoholo, li plezure retenu ĝin, ni ne bezonas ĝin, ni ja havas nian bonan brandon.

Pastro ekvidas, ke knabo vane klopodas atingi la sonorilbutonon ĉe la dompordo. Afable li aliras kaj sonorigas. Post tio diras la sentaŭgulo: „Sed nun via pastra moŝto, estas tempo, ke ni tuj forkuru!“

En la pakajneto de kupeo troviĝas paketo, el kiu elfluas terura malodoro. Unu el la kunvojaĝantoj rigardadas furioze la alian; tamen neniu scias certe, al kiu ĝi apartenas. Baldaŭ la vagonaro atingas stacionon. Tiam vilaĝano venas rapidege el la najbara apartaĵo. „Senkulpigu min, li diris, gesinjoroj, sed la fromaĝetoj en la paketo malodoris tiel terure, ke mi ne povis teni ilin ĉe mi mem.“

El la „Kölsche Krätzcher“ esperantigis Fritz Elkan, studento, Köln.

Itala.

— Kiam vi edziĝos kun mi, estos necese, ke vi ĉesu fumi.
 — Bone kara mia.
 — Kaj ankaŭ trinki.
 — Jes karulino.
 — Kaj plue iri klubon.
 — Sed karulino!!!
 — Ĉu vi rememorigas per tia iniciativo ion, kion vi plue devos forigi?
 — Jes, mi forigas la intencon edziĝi!

Tradukis Prof. Ugo Tamburrini, Monturano.

Kroata.

— Kamparano bezonante advokaton venas urbon kaj demandas: „Diru al mi kie loĝas la sinjoro, kiu pro mono mensogadas.“

— Universitata profesoro: Sed vi ne vizitis miajn antaŭleĝojn.

— Studento: Tamen, sinjoro profesoro, mi ĉiam staris malantaŭ la kolono dum viaj antaŭleĝoj.

Prof.: Honto! Vi estas hodiaŭ la kvindekkvina kiu al mi diras la samon.

R. R.

Pola.

Rapida decido.

Jes, mia amiko, mi jam estis edziĝonta kun la grafino, kiam mi eksciis, ke ŝi pagas jare tridek mil spesnilojn al sia kudristino por la vestoj . . .

— Nu, kaj vi? . . .

— Mi edziĝis kun la kudristino.

Kulo.

* * *

Lakeo: Mia sinjoro hodiaŭ ne akceptas vizitantojn; li skribadas siajn rememorojn.

Vizitanto: Ho, kia favora okazo! diru al via sinjoro, ke mi venis por rememorigi lin la ŝuldon, kiun mi jam de longe ne povis ricevi.

Patro: Ĉu ci perdis la saĝon, estinte dum du monatoj en *Monte-Carlo* kaj ĉiam hazardludinte?

Filo: Sed patro, mi gajnis 200000 frankojn dum tiu ĉi tempo!

Patro: Tiam ci estas malsaĝulo, ĉar vi ne restis tie kaj ludis plue.

El pola lingvo tradukis J. W. Barclay de Tolly.

Kvar rusaj:

Simpligita Esperanto.

En Esperanto ekzistas la vortoj: piedo, ŝtrumpo, boto, galoŝo; sed la tri lastaj ŝajnas esti superflujaj, ĉar oni povus anstataŭi la lastajn tri per: piedingo, piedingingo kaj piedingingingo. Ĉu ne vere?

* * * Anonimulo.

Vera kaŭzo.

A: Ĉu Aŭstroj kaj Serboj ekmilos?

B: Ne.

A: Kial ne?

B: Ĉar ankoraŭ ne ekzistas serba eldono de la gvidlibreto Ruĝa-kruca.

L. T.

* * *

Filo de hebreo finis kurson de gimnazio. Oni gratulas la hebreon, sed li trankvile respondas:

— „Tio estas nenio mirinda.“

— „Nu“, oni rediras, „via filo nun povos trakuri kurson de universitato, li estos doktoro, advokato, legisto . . .“

— „Kaj tio estus nenio mirinda“, tielsamamiane la hebreo respondas.

— „Sed li eble iĝos generalo, ministro.“

— „Ankaŭ tio estus nenio mirinda.“

— „Ĉu vi esperas, ke li iĝos reĝo?“


— „Ĉu do vi eble pensas, ke li estos dio?“

— „Tio ĉi estus nenio mirinda, ĉar unu el ni faris tian karieron.“

V. Blagonravov.

Sinjinoro: Ĉu vi deziras ricevi ateston? Mi devas vin antaŭsciigi, ke ĝi tute ne estos bona...

Ĉambristino: Volu nur skribi en ĝi, ke mi servis ĉe vi tri monatojn; tio-ĉi estos plej bona rekomendo...



— Rigardu, kian dikan kolegon havas tiu sinjoro!

— Kian kolegon? — Li ja estas sola...

— Jes, li estas sola, sed tamen li havas tre dikan kol'eg'on.

Fundamente.

— Ĉu via filo finis nur du klasojn de gimnazio?

— Jes, sed fundamente: en ĉia klaso li estis po du jaroj.

El lingvo rusa Deŝkin, Vilno.

* * *

Geografia leciono.

Profesoro: Vi troviĝas en Sud-Ameriko kaj estas traveturanta Italujon. Per kio vi komencos tiun ĉi vojaĝon?

Lernanto: Per kunligado de la vojaĝa valizo.

Naivulino.

— Ĉu efektive, panjo, la hebreoj ne forprenas siajn ĉapelojn en la sinagogo?

— Certe, mia infano.

— Tion ĉi mi ne komprenas; kia intereso do je viraj ĉapeloj?

v. Jankjeviĉ.

Serba-Montenegrana.

Instruista pano.

Inspektoro (al instruisto): Pro kio vi ne instruis la lernantojn je kanto?

Instruisto: De kiam mi estas instruisto, mi ne povas kanti!

La imperiestro Nikolao I, vojaĝante tra Rusujo, en ĉiuj lokoj, kien li venis, eniris la preĝejon. En unu vilaĝo salutis lin pastro per tre mallonga parolo. La imperiestro ekmiris al tiu mallonga diro, kaj diris al la pastro: „ripetu, via pastra moŝto.“ La pastro ripetis sian parolon. La imperiestro elirante la preĝejon donacis al la pastro 100 rublojn. La pastro diris al la imperiestro: „ripetu, via imperiestra moŝto.“ La imperiestro ridis kaj ripetis kun dua cento.

Juĝatino: Eminentaj juĝistoj, mia edzo estas vera frenezulo, mi ne povas kun li vivadi — li estas vere frenezulo.

Juĝisto (al la edzo): Kion vi je tio ĉi diras?

La edzo: Ŝia diro estas prava vero, ĉar se mi estus estinta saĝa, certe mi ne estus edziĝinta kun ŝi.

Du junaj sinjorinoj laŭdegis siajn edzojn; je tio tria diris:

— Ha, tio ĉi estas nenio; kiam mi tudas, mia edzo tudas anstataŭ mi, por ke ne turmentu min.

Pastro Risto M. Popoviĉ-Ĉupiĉ, instruisto, Danilovgrado, Montenegro.

Seriozaĵoj.

Tiu ĉi rubriko alportos de nun artikolojn popularkompreneblajn el ĉiuj pens- kaj sciregionoj, kiuj ne posedas ankoraŭ Esperantan fakgazeton, escepte el politiko.

La batalado kontraŭ la opiomalvirto en Ĥinujo. La Ĥina registaro konsekvence daŭrigas la bataladon kontraŭ la opio sur la vojo jam de kelkaj jaroj surirata. Ĝi estas petinta helpon de la aliaj ŝtatoj kaj kunvokinta *Sangaŭ* on specialan konferencon, je kiu estas aperintaj registaraj reprezentistoj el anglujo, usono, germanujo, francujo, rusujo, turkujo, Ĥinujo, japanujo, holandujo, portugalujo, siamujo kaj persujo. La ĉefgubernisto de *Liangkiang* kaj komerc-gardisto de la sudaj havenoj estas malferminta la traktadojn de la opiokomisitaro per grava parolado. La paroladinto memorigis la imperiestrajn ediktojn kaj tion kion Ĥinujo jam estis farinta por la subpremo de la papavkulturo precipe en la malsupra *Jangtsevalo*. Ĥinujo esperas, li diris, ke ĝi post du jaroj estos tute subpreminta la papavkulturon precipe en la malsupra *Jangtsevalo*. *Tuan-fang* tiam apelaciis al la bonvolo kaj malprofitemeco de la partoprenantaj ŝtatoj, por ke je intereso de la civilizacio la subpremado de ĉi tiu veneno povu esti plenumata. Por tio estas bezone, li diris, ke Ĥinujo ricevu la kontrolon per la starigo de la monopollo. Fine la ĉefgubernisto dankis pro tio ke Ŭsono estis proponinta kunvoki komisiitaron kaj ke Anglujo komplezeme helpinta je intereso de la humaneco. La parolado grave impresis. Bedaŭrinde la konferenco dum ĝia plua paŝado kaj fino ne ankoraŭ estas maturiginta la fruktojn, kiujn Ĥinujo el ĝi esperis; la komercpolitika intereso de la ŝtatoj partoprenantaj je la opio-kulturo kaj debito estas montriginta pli forta ol ilia humaneco. Ĥinujo devos klopodi ankoraŭ obstine, por venki la kontraŭinteresojn kiuj kontraŭstaras al ĝia socialhigiena grande planita antaŭrimedo.

Poetsorto. Malriĉe kaj mizere mortis antaŭ kelkaj tagoj la skota poeto *Richard Owen*, kies versaĵoj kaj kantoj estas tre amataj. La angla ĉefministro, estinte sciiginta la mizeron de la poeto, je rekono de liaj meritoj pagigis al *Owen* donacon da 100 funtoj sterlingaj. Sed jam estis tro malfrue: en la malriĉul-

ejo de *Festiniog Richard Owen* estis mortinta la matenon de la tago, je kiu al li la donaco estis transdonota.

Rimedo kontraŭ la kuljoj trovis la en *Wiesbaden* loĝanta direktoro de fiŝkapejo: *Bartmann* je vegetaĵo nomata *Azolla*. Laŭ sciigo al li el la germana kolonia oficejo la eksperimentoj, kiujn la instituto kontraŭ tropikaj malsanoj faris en *Hamburg* kaj *Wilhelmshaven* kun *Azolla*, sukcesis tiel bone, ke oni intencas daŭrigi la eksperimentojn en la tropikaj kolonioj. Tropika kulspeco estas konate la transportanto de la danĝera kaj timata dormmalsano.

Sociala virinlaboro por rajtprotektio. Laŭ multoblaj spertoj virinoj kaj knabinoj, kvankam loĝante en rajtŝtato, ofte el ĝiaj bonfaroj ne povas profiti, parte ĉar ili ne scias la leĝojn, sed precipe ĉar ili timas la advokaton kaj elspezojn. Tial en Dresdeno en la jaro 1894 estis provate aranĝi senpagajn konsultohorajn, dum kiuj aferoj kaj demandoj de senkonsilaj virinoj estas akceptataj kaj respondataj ekskluzive per virinoj. Kiel oni scias la ankoraŭ nova virina aktiveco rilate al virina rajtprotektio estas rapide atinginta altan gravecon. Per ĝia honorofica laboro plenumita de virinoj ĝi estas multe kunhelpinta akriĝi la socialan konsiencon kaj disvastigi la ideon, ke senpaga rajthelpo por la malriĉuloj estas sociala devo kaj ke neniam eknaskiĝu en homo la sento de rajtofendo kaj senprotekteco pro monmanko. — En ĉirkaŭe 90 urboj de Germanujo estas nun donacataj konsilo kaj helpo al la malriĉaj rajtserĉantaj virinoj per virinoj. Oni helpas al ili enkasigi ŝuldojn, atingi el la patro vivsubtenumojn por needzaj infanoj, oni informas rilate al edzaj malpacoj, verkas testamentojn kaj leterojn ankaŭ fremdlingvaj, zorgas ke ili edzkontraktu, kio je la nunaj leĝaj ediktoj estas necesega; oni peras je malpacoj rilate al lua pago kaj salajro, montras al ili, kiele ili estas procesantaj, kaj akompanas ilin je cirkonstancoj ĉe tio, oni instruas ilin pri la uzo de libervola ŝtata invalida asekuro,

elserĉas por ili eksterlandajn adresojn kaj plue servas al ili multspeckmaniere. Multnombraj estas la esprimoj de la dankemo pro ĉi tui aktiveco.

Sed la graveco de la virinaj rajtprotektejoj preteriras multe la prizorgon de certaj disaj aferoj. La premegatinoj, nezorgatinoj trovas virinojn, kiuj amplene studas ŝiajn zorgojn kaj ĉagrenojn kaj por kiuj barilo rilate al rango aŭ pli alta instruataco tute ne ekzistas kontraŭ la senhela sekskunulino. Per tio tiu ĉi virina laboro kreas ponton por kompreniĝo kaj repaciĝo inter popolklasoj sociale apartigitaj, kaj plenumadas tute trankvile gravan kulturlaboron. Tiele la konsultorinoj por la virina loĝantaro, kiu plej ofte timas kaj ĉiam timos voki viran interhelpon, estas utilaj. Kiel ofte oni povis jam eniĝi en tiajn specialajn aferojn akcelante, perante, helpante al rajtoj! Geprudentuloj estas jam ofte elparolintaj, ke la etikaj kondiĉoj de tiuj ĉi specialaj taskoj de la virinaj rajtprotektejoj povos neniam esti plenumataj de aliaj organizadoj, aŭ anstataŭigataj. Depost la jaro 1904 la germanoj kaj aŭstraj rajtprotektejoj estas kunigintaj al unuigo, por ke estu kreata tia senpaga konsultejo laŭeble en ĉiu urbo, precipe en tiaj kun industria loĝantaro. Jes, tra la tuta civilizita mondo devus disvastiĝi reto de ĉi tiuj rajtprotektejoj, kiele krom Aŭstrio jam estas komencintaj ankaŭ Svisujo, Italujo kaj Svedujo. Granda plimultigo de ĉi tiuj rajtprotektejoj ne nur signifas plimultigon de utilaj lokaj organizoj, sed ebligas al la disaj unuigoj laŭplanan interlaboradon, kiu ekzemple malhelpus prokrastemajn ŝuldatajn, kiele nun okazas, forpreni sin de la plenumo de maloportuna devo per ofta ŝango de restejo.

La virina rajtprotektejo estas valora sociala organizo ne nur por la helpserĉantinoj, sed ankaŭ al la helpantinoj mem ĝi donas valorojn. Per la laboro en la rajtprotektejo ekaperas virinaj fortoj alie senkulturaj, kiuj povas esti farataj fruktoportaj por necesa helpaktiveco en la homa societo, al kiu hodiaŭ admonante nin vokas la nuntempa sociala konscienco kaj precipe la ĉiam pli vigliga konscienco de la virinoj.

Sino J. Salinger, Dreseno.

Saniga preĝado antaŭ juĝistaro. Saniga preĝistino estis kulpigata, por ke ŝi repagu la honoraron de malsanulo pagitan, ĉar ŝiaj preĝoj estis sensukcesaj. La kulpigo havis la sukeeson, ke la saniga preĝistino devis repagi la sumon ricevitan. La kondamno estis argumentata jenamaniere: „Tute ne estus harmonie al sanaj socialaj statoj, se kontraktoj laŭprofesie faritaj estus leĝe ŝirmataj, ĉe kiuj la kontraktulo de la partioj celas tien ke la unu partio uzu kontraŭ fiksa pago sian laŭ aserto ekstre proksiman rilaton al Dio, por enporti asertitan eniĝon de transcenda fortoj en la vivon de la alia partio. La kredo ke iu povas sanigi malsanulojn per speciala Dia favoro, ekzistas eble ĉe sufiĉe multaj homoj; sed la arogado de tia saniga forto kune kun la aktiveco de monakiranta profesio, kiu fondiĝas sur tiun ĉi sanigforton, kontraŭas la ĝeneralan moralan sentadon, almenaŭ tiun de la klerularo, do de la subtenantoj de la kulturo, tial ne povas ĝui leĝan protekton. Krom tio la publika intereso por reguligata sanecflegado en la popolo ŝajnas malŝirmata per tio, ke malsanuloj per la influo de la *Christian science* estas forprenataj el la laŭafera kaj ĝustatempa kuracado per kuracisto, kiu do estas la rajtigita gardisto de la popola saneco. Tial al kontraktoj similaj al tiu farita inter la kulpiganto kaj la kulpigatino la leĝa konsento devas esti rifuzata, el kio la repagdevo sekvas.“ Estas la unua fojo, ke juĝistaro tiel decide akceptas la vidpunkton, ke la kuracisto estas juĝota la rajtigita gardisto de la popolsaneco. La malbonoj kaŭzitaj per la fuŝkuracado estas fine malfermitaj la okulojn al la estraroj pri tio, ke tiu ĉi fiaktivado estas movado malamika al la ŝtato kaj kulturo, kontraŭ kiu movado tial bezonas pleje bataladi.

Pierpont Morgan estas donacinta 250 000 dolarojn, por ke povu aperi granda dudekvoluma mirinde ilustrata verko pri — ? — pri la indianoj. Tiu ĉi ridindan bagatelon ni legadas en tutmonda gazeto. Ĉu tute ne estas tie transe „samcelano“ entuziasma kaj maltime, kiu klarigus al ĉi tiu miliardulo, kiele li povus nekompareble pli potence kaj grandegskale utili al la homaro per sia monstra riĉeco?? Ankoraŭ neniam oni sciigis, ke tia amerika riĉegulo helpis nian gravan movadon. Tamen kia unika okazo por grandioza helpo!

Religia konfeso kaj kadavra bruligado. Interesa tabelo pri la partopreno de la disaj religiaj konfesoj je la progresoj de la kadavra bruligado sciigas, ke el la 4050 personoj en la jaro 1908 en Germanujo kiel kadavroj bruligitaj troviĝis 3236 evangelianoj, 299 katolikoj, 35 malnovkatolikoj, 153 hebreoj, 72 liberreligiuloj, 49 disidentoj, 9 anoj de aliaj konfesoj, 197 tiaj sen sciigo pri sia konfeso. Ĉe 2517 el tiuj 4050 bruligoj okazis religiaj funebraj ceremonioj en la brulejo. Ĉi tiu statistiko do refutas la certigon, ke konfesaj demandoj ludas ĉefrolon rilate al la kadavra bruligado.

Abono jare . . . \$ **1,20** = 2,40 Markoj = 3 Frankoj
= 2,40 Ŝilingoj = 0,6 Dolaro
= 1,2 Rublo = 2,88 Aŭstr. kronoj
= 2,16 Skandin. kronoj.

entenate la sendkosto.

Ĉiu abono donas la rajton de 4 anoncaj linioj.

Oni abonas ĉe ĉiuj librovendistoj, krom tio en

Anglujo: ĉe The British Esperanto Association, Museum station buildings 133-136 High Holborn, London, W.C.

Argentinlando: ĉe Sro Gerardo Muñoz; casilla de correo, 737, Buenos Aires.

Aŭstrio: F. Topič, ferdinandova 4, Prag.
E. Weinfurter, Vodickosa ul., 11, Prag.
Francisko Piša, librovendejo, Hradec Králové, Bohemujo kaj ĉe Joh. Frisch, Mähr. Ostrau.

Belgujo: ĉe Spineux kaj Co., 3 Rue du Bois Sauvage, Bruselo kaj ĉe Jacques Mertens 5, Avenuo de Keyser, Antwerpen.

Bulgarujo: ĉe Sro Iv. H. Krestanof, Profesoro de Esp., en Pirdop.

Danujo: Esperanto oficejo, Ad. B. Hansen, Norre Farimagsgade 58, III, Kopenhago.

Finlando: ĉe Ilarejo Esperantista, Helsingfors.

Francujo: ĉe G. Warnier, 15 rue Montmartre, Paris. — Kaj Presa Esperantista Societo, 33 rue Lacépède, Paris.

Hispanujo, Barcelona: ĉe Kiosko „Blanco y Negro“ y „ABC“ de Ramon Muntané, Rambla de las Flores (sola agente, sed nur por Barcelona). — Ĉe Manuel Fuentes, Bilbao, Bidebarrieta 9.

Hungarujo: ĉe Wilhelmo Serator, libraro, Szenicz (Ng. m.) kaj Johano Medgyesi, prof., sekretario de Hungara Esp. Soc., Budapeŝt.

Japanujo: ĉe Ĉef Toŝio, Sekretario de Japana Esperantista Asocio, Jurakō, Kojimaĉik, Tokio.

Italujo: ĉe Sro Avvocato Nicolasi Alvise, Vittoria (Siracusa).

Meksikujo: Administrejo de la „Verda Stelo“, Apartado 2759, Mexiko.

Montenegro: ĉe Pastro Risto M. Popović-Ĉupić, instruisto, Danilov-grado.

Moresnet: ĉe Charles Schriewer, Moresnet-Neutre, Amikejo.

Polujo: ĉe Librejo de M. Arct, Varsovio, str. Nowy-Swiat 53.

Rumanujo: Administrejo de la „Romana Gazeto Esperantista“, Bukarest, str. coltei 16.

Rusujo: ĉe Libreldonejo Esperanto, Moskvo (Rusujo) Valovaja ul., Dom serpuhovskovo Mon., Kv. 5.

Turkujo: ĉe Sro Jacques Guéron, Instruisto, Lernejo Alliance Israélite, — Aŭdin, Azia Turkujo.

Usono: ĉe Bourse Translation Bureau, 519 North Eleventh-street, Philadelphia, Pa.

Por ĉiuj aliaj landoj mi serĉas agentojn.

Fine oni abonas ankaŭ senpere ĉe la administrejo:

Richard Bresch, Leipzig (Germanujo)
Körnerstrato 31, p.

Anoncoj. La anonca linio „Petit“ por kvarona larĝo de pago kosta 15 Sd.

Mi plenvalore akceptas la ĉekojn de la Ĉekbanko Esperantista.

Malgranda pririgardo pri esperantista movado.

Anglujo. En la mezo de Londono fariĝis nova grupo „Charing Cross“. En Reading oni enkondukis Esp. en la duagradan „Collegiate School“. Plua nova grupo en Mirfield.

Aŭstralio. La estro de unuagrada lernejo en Invercargill instruis 15 gelnantojn, kaj deĉunu el ili sukcesis plenumi la ekzamenon de B. E. A.

Aŭstrio. „Germ. Aŭstria Esp. Ligo“ sukcesis interesiĝi aŭstrian ministerion de fervojoj por esperanta afero.

Bohemujo. „Bohema Unio Esperantista“ havis ĝeneralan kunvenon, kie estis reprezentitaj 26 bohemiaj societoj kunigante pli multe ol 1000 bohemiajn esperantistojn en Aŭstrio.

En Zagreb (*Kroatujo*) aperis kroataj gramatiko, broŝureto pri Esp. (baldaŭ ankaŭ vortaro) kaj „Kroata Esperantisto“, monata organo de la „Drŭstvo hrhatski esperantista“ (Societo de kroataj Esp. stoj).

Francujo. Novaj grupoj fondiĝis en Bar sur Aube, Cholet, Lorient, Mayenne.

Germanujo. Lia Moŝto la Duko Carl Eduard von Sachsen-Coburg und Gotha akceptis la protekton de la nacia germana

kongreso (21.—23. de majo 1909). Estas fonditaj Bavara Ligo, Vurtembergia Ligo, Sudokcidenta kaj „Ligo de Rejnlandaj Grupoj esperantistaj.“ — Pli ol 60 saksaj grupoj sendis delegitojn al la Ila kunsido de la Saksia Esp Ligo en Mittweida. Novaj grupoj fondiĝis en: Bautzen, Borna, Dinkelsbühl, Dresden—Klotzsche, Eibau, Kempten, Reichenhall. La Idista grupo berlina ĉesas la nuran propagandon de Ilo kaj volas kun egala intereso studadi aliajn sistemojn. En Dresden ekzistas de 17 ilistaj societoj ankoraŭ nur 1.

Grekujo. Samosa Esp. Societo eldonas gazeton „Greklingva Esperantano“. Precipe en Samoso ni havas bonajn rezultatojn.

Hindujo. Ekzistas grupoj en Calcutta, Jetpur, Surat, Ahmedabad, Agra, Travancore, Allahabad kaj Bombay.

Hinujo. Sro Lu-Si-Cin gvidas esperantan kurson en Shanghai kaj volas fondi poste „Hinan Esperantistan Asocion“.

Hispanujo. Nova grupo en Arbeca.

Japanujo. „Japania Esperantisto“ estas de nun redaktata grandparte en Esperanto kun multaj ilustraĵoj kaj pritraktos speciale ĝeneralajn temojn de Ekstrema Oriento. La abonkosto plialtiĝis je 2 yen (2 ¥). (Adreso: „Japania Esperantisto“ Marunouchi, Tokio, Japanujo.)

Portugaliujo. Fine ankaŭ tie ĉi aperas gazeto, kiun ni jam de longe bezonis. Bonan sukceson al „Portugala Revuo“!

Rusujo. Ni ricevis la 2^{an} numeron de gazeto „Volna Esperanto“ (La ondo de Esperanto) aperanta en Moskvo, sed ankaŭ nun reaperis malnova nia amiko „Ruslanda Esperantisto“ en St. Petersburgo zorge redaktita kaj bele presita.

Rumanujo. R. Esp. Societo faras specialan kurson por liceaj kaj gimnaziaj lernantoj en Bukureŝto. Sro leŭt. Urechia instruas Esperanton en la marista lernejo en Constanza, laŭ deziro de la komandoro.

Svisujo. En Neuchâtel oni gvidas kurson en la ŝtata

normala lernejo kun oficiala aprobo. Nova grupo estas fondita en Laŭsanne „Frateco“.

Ameriko. Tri favoraj proponoj por Esperanto estis unu-voĉe akceptitaj je la Unua Tutamerika Scienca Kongreso en Santiago de Ĉilo.

Poŝta kesto de la redakcio.

Triesta rondo. Je via afablega poŝtkarta kolektivsaluto mian koran dankon. Mi konas vian belan havenurbon, mi estis tie antaŭ kvardek jaroj kiel junulo kaj revis en la ĝardeno de la fama kastelo *Miramare* pri la pasemeco de ĉia homa terfeliĉo. Hodiaŭ mi estas maljunulo kvankam junakore kaj sopiras printempe la molegan klimaton de viaj pentrindaj marbordoj. — Eŝcepte Rusujo, mi ŝuldas al multlingva Aŭstrio la plej multajn abonintojn, ĝi estos proksimaestonte rilate al Esperanto la modellando, profitos sendube el ĝi pleje, kaj espereble baldaŭ. La tasko de via rondo ĉe tio estas kaj estos gravega. Sed kial la tro modesta termino: rondo? mi nombris do 20 nomojn.

Estinta ĉefkuracisto! Certe vi estas prava, sed naĝi kontraŭ fluo estus al mi preskaŭ memmortigo, tuj oni eklendkrius: kia malsimpla, kia malgracia stilo! — Krom tio konsideru, ke uzado kvankam malkorekta de nur unu estintotempo plifaciligas al la komencantoj komprenadon. Sed kunlaborantoj estas ja liberaj, ili povas verki korekte, ĉar mi ne havas permeson korekti en kunlaboraĵoj plie ol krudajn malkorektaĵojn.

K. Moskvo. En januaro „La Spr.“ ne aperis.

R. R. Kiel unua el via nacio vi memkompreneble estas bonvenanta, tamen ankaŭ por vi valoras: nur la plej bono estas sufiĉe bona. La unua numero jam ne estas liverebla.

Kunlaborantoj, kiuj intencas liveri desegnaĵojn, ne volu uzi kraĵonon aŭ eĉ ordinaran inkon, sed laŭeble finan inkon.

La teatra prezentado

en Chemnitz

okazos la 24^{an} de Majo.

„Alvoko pri kvina internacia kongreso.“

Ĉiu partoprenonto de la kvina kongreso sendu tuj sian fotografon al „Esperantista Kongreso Barcelona“. Sur la antaŭa parto skribu supre la nomon de via lando, malsupre de via lando, malsupre de via familio kaj urbo. Sur la posta parto estu via adreso.

La fotografaj estos kolektitaj. Tiu kolekto estos bona propagandilo jam antaŭ la kongreso.

Ĝi helpas multe al la kongresanoj, ĉar per ĝi ili povos vidi, kiuj de iliaj konatuloj partoprenos. Ili povos serĉi la nomojn de gesinjoroj, kiujn ili jam konas, sed kies nomojn ili estos forgesintaj.

Sinjoro **Z. Kisielewski**, Biala, Siedlecka gub., Strato Krzywa, Ruslanda Polujo deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun alilanduloj.

Jonko Davidoff-Silistra (Bulgarujo) serĉas unu laboranto por sia fabriko: fabrikado de ŝoveliloj feraj, kaldronoj galvanizitaj k. t. p. La kandidato devas scii bone tiun ĉi oficon.

Grupo Esperantista Philippeville (Alĝerio) deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun ne-francaj Esp. Sin turni al la sekretario.

Instituto por komercista praktika librotenado

Posedanto: **A. Becker.**

Altona (Germanujo), komercisthejmo, Königstrato 137.

Letera instruado pri librotenado de ĉiuj sistemoj, de la „simpla“ ĝis la plej moderna sistemo, la „*Infinitum*“ kaj la „*Hansa*“ mallongenskrubado.

Laŭ praktikaj modeloj per memlaborado kaj per detala pritraktado de la kambia kaj ĉeka doktrino same kiel ankaŭ de la procedo de la bankasignado laŭ *Hamburga* modelo. Kurso 6 Mk. = 3 S.

AGENTOJ DEZIRATAJ: — Agema viro en ĉiu urbo povas gajni liberalan profiton vendante bonajn komercaĵojn. Por plena informo adresu al Esperanto Export Association, 404 Security Bldg, Chicago, U. S. A.

Eugen Esterak, M. Ostraŭo Moravio, Aŭstrio, interŝanĝas ilustritajn vidaĵkartojn. Ĉiam respondos.

Deziras korespondadi kun *brazila* instruistoj Lor. Sedlmayr, Ostrogo, Volina Gub., Rusujo.

Sro D. Sevastjanov, jarmoroĉnaja pl. 1, Stavropol, Kaŭkazo Rusujo, tre deziras interŝanĝi il. p. k. kaj uzitajn p. m. ĉiam kaj tuj respondos.

Sjoro. Sigm. **Hömg**, farmaciisto Budapeŝto (Dob 38) Hungarujo; deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn. Al kiu ajn ĉiam tuj respondos. La poŝtmarkojn ankaŭ kolektas.

J. Hartglas, Rusujo-Polujo, Biala Siedlecka deziras korespondadi kun gealilanduloj.

Per leteroj aŭ il. p. k. deziras korespondadi kun eksterlanduloj **Arnold Behrendt**, Breslau, Augustaŝtrato 16.

Manuel Catalán, Higuera de Arjona (Jaen) Hispanujo, interŝanĝos ilustr. p. k. kaj p. m. kun ĉiulandaj gesamideanoj.

R. M. Ĉupiĉ, Danilovgrado, Montenegro, tre deziras ricevi specimenajn numojn de esp. gazet-jurnaloj el tutmondo. La grava celo estas la propagando en Montenegro.

Sro Vasil Simjonov Baĉvarov, Ur. Varna (Bulgarujo) tre deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn. Ĉiam kaj tuj respondos.

Dro Nikolaj Kostjanicin en Bjeŝjeck, provinco Tver, Rusujo deziras korespondadi per ilustr. poŝtkartoj kun esperantistoj alilandaj.

Sro kaj sino Evstratov deziras interŝanĝi kaj korespondadi ilustritajn poŝtkartojn kaj leterojn. Rusujo, Astrahan, al ŝtaps-kapitano. Carevskij batalion.

Al tiu kiu sendos al mi sian fotografon mi sendos la mian. Adreso: Rusujo Vologda Ĉuŝevici, Al Sro Neupokoef.

Adolf Seipel, M. Ostraŭo, Bräuhausstrato 20, interŝanĝas ilustritajn vidaĵkartojn.

Tre estimata sinjoro!

Mi konsumis de via *Rino*-ŝmiraĵo tri skatoletojn po Mk. 1 — bonasukcese. Je mia malsana kruro mi aplikis jam diversajn rimedojn, sed neniu plaĉis al mi tiel bone kiel via bonega ŝmiraĵo.

Berlin, la 11. ^{an} de Jan. 06.

Altestime

F. SOMMER.

Tiu ĉi *Rino*-ŝmiraĵo estas bon-sukcese aplikata kontraŭ suferado de kruroj, likenoj kaj ekzemo; ĝi estas proviza en apotekoj en skatoletoj po Mk. 1.15 kaj Mk. 2.25, sed malfalsa nur en origina pak-aĵo blanka = verda = ruĝa kun firmo *Schubert & Co., Weinböhla-Dresden*. Falsaĵojn rifuzu!

Sro Iv. H. KRESTANOF, str. Bezimenna No. 5, en SOFIO (Bulgarujo), serĉas kaj tre deziras interŝanĝi aŭ aĉeti ĉiueblajn malnovajn (kolektas ankaŭ la novajn) esperant. gazetojn, verkojn ktp., Posedantoj skribu al li!

Univ. stud. Rubĉiĉ petas gazetajn specimenojn por rondira ekspozicio, Graz, Gartengasse 19.

Sro Jos. Štěpán, Lhota, poŝto Velká Jesenice, Bohemujo-Aŭstrio (deziras korespondi per il. kartojn).

Andro Pornek, Ŝirokaja ul. 4, Vindava, Kurl. Gub. (Rusujo), deziras korespondadi per ilustr. poŝtkartoj kun geesperantistoj, ĉiam tuj respondos.

Wilfrid Wyld, Penraevon, The Avenue, Lidgett Park, Roundhay, Leeds, England deziras interŝanĝi ilustritajn P. K.